

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

“Muzeo” en preparo, januare

Esperanto-Muzeo Jokohama, cele al la oficiala malfermo en aprilo, estas daŭre ŝanĝiganta.

(1) La unua etaĝo: Tie estis ĉambro kun tatamoj ĉe planko, sed ni reformis tion kun la ligna planko, kaj nun uzeblas tute ligneplanka ĉambro kun 24 kvadrataj metroj, kiel kunvenejo por pli ol 20 personoj aŭ kiel ekspoziciejo.

(2) La dua etaĝo: Oni uzas ĝin kiel lernoĉambro. Ĉiuj klasoj, krom tiuj farataj per interreta “Zoom” nun lernas tie. Tre dankinda afero, ĉar la kutima kunvenejo publika, nome la Guberniana Centro, estas fermita pro la kontraŭkronviroza konsidero.

(3) Aranĝo de la dokumentoj: Ĉirkaŭ 7000 dokumentoj (2400 libroj, 4000 gazetoj ktp) estis katalogitaj.

ŝtuparo al la dua etaĝo
enirpordo



la unua etaĝo

Gratule venis mesaĝoj el la mondo

El s-ino Tatjana Auderskaja (Rusio)

Karaj geamikoj!

Mi gratulas vin okaze de la aĉeto de nova domo por muzeo. Deziras fruktodonan laboron de la Muzeo kaj de Hama-Rondo! [...]

El s-ro Petr Chrdle (Ĉeĥio)

Karaj japanaj amikoj,

Nun mi skribas al vi por gratuli vin al la aĉeto de la domo kaj al la fondo de Eo-muzeo. Kelkaj viaj klubanoj eble rememoras min, amikon de Japanio, kiu estis en via bela lando dekfoje kaj en Jokohamo dufoje (se mi ne eraras en 1995 - mi ĉeestis tie la Japanan Eo-kongreson kaj duan

fojon dum la UK. Do mi decidiĝis donaci al via muzeo iujn librojn el mia eldonejo KAVA-PECH [...]

[Ankoraŭ daŭras detala plano pri la donacado kaj interŝanĝado. Pri tio estas komencita komunikado kun s-ino Doi. --- redakcio]

El s-ino Franciska Toubale (Aŭstralio)

Saluton kaj koran dankon. Estas al mi ĝojige ke vi decidis reaperigi vian bultenon "Novaĵoj Tamtamas". Mi deziras al la tuta rondo feliĉan jaron 2021, energion por la laboro farenda kaj kondiĉojn, kiuj permesos vizaĝ-al-vizaĝajn renkontiĝojn.

La 118-a Legokunsido

En la 5a de junio ni havis la 118-an legokunsidon pri libro libere elektita. (per Zoom)
6 personoj partoprenis.

Saluton, mia Baghy! “La teatra korbo”

Aida Yayoi

Jam pasis 18 jaroj de kiam mi tradukis vian romanon, “Sur sanga tero”. Dum tiuj longaj jaroj mia pasio al vi estis iom post iom perdita, alivorte, via figuro malproksimiĝis el mia konscio. Komprenoble mi ne forgesis vin; vi estis por mi la plej respektinda, sopirata verkisto en la esperanta literaturo. Ĉi-foje, tamen, vi subite aperis antaŭ miaj okuloj kvazaŭ nenio rilatas al via longa foresto. Via voĉo aŭdiĝis klare kaj mi senĝene, tre nature eniris en vian mondon. Kara s-ro Baghy, mi ĝojas vidi vin denove! Via libro, “La teatra korbo”, kondukis min al via mondo kiel antaŭe. Sentante grandan feliĉon renkonti vin post longa silentado, mi nun parolos pri la libro, kiu donis al mi ŝancon legi vin denove.

Por la junia legokunsido de Hama-Rondo mi elektis la libron, “La teatra korbo” eldonitan en Leiden en 1934. Ĝi estas malnova, sed en tiu epoko viaj ĉefaj libroj publikigitaj sinsekve: Viktimoj 1926, Hura! 1930, La vagabondo kantas 1933, Verdaj Donkiĥotoj 1933, Sur sanga tero 1933.

“La teatra korbo” estas malgranda libro kun nur 110 paĝoj, el 12 noveloj, kun temoj diferencaj sed la esprimoj kaj vortuzadoj esence samaj. Amantoj de via literaturo tuj distingos vian voĉon en la sceno, identigos la Baghy-koloron en la skribaĵo.

El la 12 noveloj mia plej ŝatata estas “La teatra korbo”, kiu ankaŭ estas la titolo de la libro. Kun la teatra trupo la korbo vojaĝas kiel enmetujo de tolaĵoj kaj ankaŭ kiel lulilo por aktoridoj. La vivo kun la korbo estas skribita de la rakontisto, kies knabineto mortis infanaĝe. El la rakonto jenaj frazoj impresis min:

Mi iris sur la vojoj de la fabellando kaj kion mi trovis, tio estis fatamorgano.

Jes! Jes! Mi vivis. Mi vivis en la patrujo de la mirakloj!

“La heredaĵo” estas tro bela novelo. Se s-ro Baghy kreskis en tia patra amo de la novelo,

estas nature, ke vi verkis tiel romantike kaj dolĉe. Sed la lastaj du noveloj sciigas min, ke vi ne estas nur dolĉa verkisto. Vi estas esploranto de ideoj, post zigzaga serĉado fariĝis “sklava amanto de Esperanto”. Via vivo instruas al mi multon, kiun mi ne digestis plene ĝis nun.

Pri “la aliulo” de Serĝo Elgo

SIBAYAMA Noriko

Min interesis la reklam-frazoj pri iu libro, “La ĉefrolulo ofte renkontas homojn, kiujn li ne konas, sed kiuj ŝajnigas ke ili tre bone konas lin. Ili malestimas lin kaj donas pli kaj pli da ĝenoj en lia privata vivo. Kiu do estas tiu aliulo?” La titolo de la libro estas “la aliulo” de Serĝo Elgo.

Mi eklegis la libron supozante, ke la epitomo estas tia, tamen ne aperis tiaj scenoj.

Beneto, sukcesa inĝeniero laboranta en Vork-Entreprenejo, edziĝis al Sofia, sekretariino en la sama laborejo. Komence Sofia ial timis lin, sed iom post iom ŝi trankviliĝis.

En ĉapitro 3 (el 12 ĉapitroj) abrupte aperas Rajmondo, patro de Beneto kaj Konrad (ĝemela frato de Beneto). Laŭ la komentario Rajmondo estas la aŭtoro mem. Post elementa lernejo Rajmondo deziris legi kaj studi plu en supera lernejo, sed pro la morto de sia patro li malgraŭvole devis lerni lignaĵisto-metion kvankam li ne estis manlerta. Lia vivo ne estis feliĉa. Lia amatino, kiu ne amis lin, edziniĝis al aliulo dum li militservis. Li ne tre bone lertis je metio. Sed li povis edziĝi al filino de dungito. Li ekhavis du ĝemelajn filojn: Beneto kaj Konrad.

En ĉapitro 4 denove abrupte aperas akuŝistino s-ino Lebrun, kiu akuŝigis Beneto kaj Konrad. Ŝi vizitas la domon de Rajmondo kaj renkontas sesjarajn Beneto kaj Konrad. Ŝi rememoris la teruran nokton, la 4an de aprilo 1944, kiam ili naskiĝis...

En aliaj ĉapitroj, aperas sceno de bankatako de gangsteroj, aŭ bandito Areŝto, filo de

mastrino de ledaĵ-vendejo.

Tiel daŭras la rakonto, kaj post duono de la tuta rakonto finfine aperas la reklamitaj epizodoj. Nome sozio (=plene simila homo) de Beneto ie kaj ĉi tie aŭdacas en diversaj kanajlaĵoj. (La sozio de Beneto ne estas Konrad. Konrad estas diligenta metiisto kaj laboras kune kun la patro.) Eble multaj legantoj rimarkas la intrigon survoje. Ankaŭ mi divenis kiu estas la aliulo ĉe 1/3 de la libro. Sed se la intrigo estas malkaŝita, kiel la aŭtoro metos finon, tio interesis min. Por la fino diversaj aludoj troviĝis en tiu ĉi novelo.

Al mi estis interesa interparolo inter Beneto, Sofia kaj ilia kolego Schmidt, kiu kredas je Dio. Beneto kaj Sofia estis indiferentaj por religioj, kaj ili elektis geedzan ceremonion sen la beno de la Eklezio. Ĉu sen eklezia geedziĝo estas tiel malofta kaj kaŭzas antipation de homoj? Beneto pensas, "Ja... tiu bela religia moralo,... kiu neniam malhelpis militon nek torturon... nek sklavismon..."

En la libro la aŭtoro, vera metiisto, nete klarigas kiel oni konstruas ponton. La fremdaj terminoj ĝenis min tamen ŝajne mi iom komprenis la manieron.

Kiel la aŭtoro finis la novelon? Li aludis ne glatan estonton de la juna paro Beneto kaj Sofia. Mi supozas, ke la aŭtoro unue ekpensis la finon kaj poste aldonis la alian parton.

"La fundo de l'mizero"

Originalo (la pola): Wacław Sieroszewski

Esperanta traduko: Kabe

Japanlingva traduko: Kurokaŭa Hitomi

(黒川眸「悲惨のどん底」)

Tanigaŭa Hiroŝi

"En la tajgo de la malproksima nordo misteraj lokoj ekzistas, pri kiuj la enlandanoj ne volonte parolas, eviteme respondante la demandojn: «tien nur la vento alflugas kaj la migrantaj birdoj sidiĝas dum sia flugo al la maro».

– Tiele iom mistifiktone komenciĝas la kapa sceno de la Esperanto-traduko de Kabe. Temis pri la homoj, "lepraj" nomite ekzilitaj de la Vilaĝa Komunumo kaj devigitaj tutizolite vivi en la jurto ĉirkaŭ 20 kilometrojn for de la Vilaĝo en tajgo en Siberio.

En la jurto vivis 7 homoj. Unu maljunulo mortis baldaŭ.

Inter ili estis nelepra junulino nomata Anka. Ŝi memvole aliĝis al la jurto pro amo al sia lepra edzo. Troviĝis ankaŭ 7- aŭ 8-jaraĝa knabineto gepatroj-nekonata, ŝajne nelepra. Estis virino nomata Mergenj kiu indignege diradis: *Mi ne estas lepra. Mia edzo perforte eniigis min ĉi tien malvere pretendante ke mi estas lepra.*

La Komunumo sendis al la jurtanoj provianton kaj ĉiutagajn necesajojn. Sed tio tute malsufiĉis. La jurtanoj kun difektitaj korpoj ĉiel penis akiri manĝaĵojn. Okazis inter ili konfliktoj, eĉ krizaj intermalpaciĝoj. Sed la komuna rezignacio de la lepreco fine interligis la samsortanojn. Zorgemo kaj bonkoro de Anka estis ĉiam konsolo de ĉiuj aliaj.

Escepto estis Mergenj. Fine, iun meznokton abrupte freneze ŝi bruligis la stalon kie dormis Anka kaj ŝia edzo. Mortis 4 inkluzive de Mergenj mem. Vivaj restis nur du solaj; maljunulino kaj la knabineto. Kelktagojn poste mortis la maljunulino pro kakeksio, kaj la knabineto atakite de urso.

*** **

Tro ŝokiga estis la kruelega finaĵo kaŭzita de la ekstravaganca indignemo de Mergenj! Ŝi estis tro senkompate perfidita de la mondo!

Jena sceno ankaŭ estis kortuŝe impresa: Kiam la sendito de la Komunumo alportis manĝaĵon malsufiĉan kaj diris: *Ne pensu, ke ni estas senkompataj. Nia Komunumo ankaŭ suferas malsaton kaj mizeron. La lepruloj kriis post la sendito: Dio benu vin! Vi vivu feliĉaj! Sed ne forgesu pri ni, la plej mizeraj el la mizeruloj!*

Ĉi tiun novelon verkis Wacław Sieroszewski (1858-1945), pola folkloristo ekzilita en sia juneco al Siberio. Dum 12 jaroj li pristudis tie, kaj reveninte al Polujo li publikigis ĉi tiun novelon en 1900. Kabe esperantigis ĝin en 1905.

La mizerega vivo de la lepruloj (nun nomataj Hansen-malsanuloj) estis ankaŭ en Japanio. Unu japana Hansen-malsanulo eklerninta esperanton en la Hansen-malsanulejo en Tokio tradukis japanlingven la novelon transe de la Esperanto-traduko de Kabe, kaj publikigis ĝin en 1930 en plumnomo Kurokaŭa Hitomi.

Pripensante la suferegan historion de la Hansen-malsanuloj mi legis la novelon.

Komentoj pri "La infana raso" de W. Auld

Mizro Iwaya

Kredeble mi ne bezonas multon diri por montri kio estas tiu libro. Ja tiel fama estas ĝi. Ĝia unua apero estis en 1956 kaj oni trovis jam la kvinan eldonon en 2009. Krome mi trovis ankaŭ alilingvan tradukon kaj eĉ sondiskon. Mirinda kaj legenda populareco kaj vendiĝo! Tial mi elektis tiun libron por prezenti al vi.

La aŭtoro mem diris ke li intencis verki *longan epopeon*, ĉar ĝuste tia verko mankis en Esperantujo. La tuta verko konsistas el 25 kantoj. Li komencis verki ĝin per la unua kanto, kiun li kontribuis al la belarta konkurso de UEA kaj brave triumfis en 1953. La unua kanto estas diverssence perfekta sendepende de la aliaj kantoj kaj, malgraŭ tio, bone harmonias kun aliaj 24. Ĉiu, inkluzive de mi, ŝatas ĝin kaj ĝi estas kerno de la tuta epopeo.

La tuta libro estigas unu sintezan filozofion. Tie la aŭtoro montras ĉion en la mondo: vivo, religio, genio, heroo, sklaveco, seksumo, universo k.t.p. Duono el ili estas kun ritmoj kaj rimoj, kiuj bone kontentigas antaŭulojn, Kalocsay kaj Waringhien. Sed aliaj estas ne.

Supozeble lia defio al la antaŭuloj. La deka kanto konsistas nur el kvin vortoj, la 23a kanto estas nur staplado de nomoj kaj ne havas vervojn. Sed tia stranga konsisto bone esprimas la tematan enhavon helpate de aliaj kantoj. Jes, tiu ĉi verko ne estas logika argumento, sed simple aludo kaj apudmeto. La legantoj devas dedukti ŝlosilon el la tuto.

Kiam la unua eldono aperis en 1956, ĝi kaŭzis grandan sensacion, sed samtempe severan perplekson, ĉar la legantoj ne povis kapti diversajn aludojn kaj citaĵojn. En la dua eldono la aŭtoro mem adiciis klarigan noton, precipe originan fonton de la citaĵoj. Li diris ke gravas dirita enhavo, ne la dirintoj. Sed samtempe li agnoskis ke elturni la originon bone helpas la leganton kompreni la intencon de la aŭtoro.

Oni diras ke la verko estas revolucia. Ĝi altigis la nivelon de esperanta literaturo al tiu de aliaj naciaj lingvoj. Do kia estis la nivelo, aŭ noveco, de esperanta literaturo ĝis tiam. Mi ekdeziris konstati ĝin per fama verko antaŭ la temata libro. Ĝi estas alia majstra verko "Streĉita kordo" de K. Kalocsay. Eble mi povos tion provi en la venonta jaro.

Strukturo de la 25 ĉapitroj de "La infana raso"

| | ritmo k rimo | paĝoj | temoj | noto | komenca unua verso |
|----|----------------|-------|-----------------------------------|---------------------|---|
| 1 | jambo, rimata | 4 | vivĉeno, interligiteco de homoj | 1a premio en UEA | Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben |
| 2 | jambo, rimata | 3 | toleremo, religio | | Kiom koncernas Dion religio? |
| 3 | jambo, rimata | 2 | nasko kaj esenca izoleco | | Prafort' mirakla senkompte premis |
| 4 | jambo, rimata | 1 | moko al politiko kaj milito | anagrama ŝerco | Laŭ gonoraloj milit' necesas |
| 5 | jambo, rimeto | 3 | seksumado | | akceptu min en vian liton |
| 6 | jambo, rimoido | 2 | superstiĉo, eklezia aŭtoritato | | Kaj sur la belon ĉi termitoj nigraj |
| 7 | jambo, rimata | 3 | rememoro kaj genieco | | ho, iam mi jubilis super |
| 8 | (sen ili) | 4 | komenco kaj fino de la vivo | dancantaj literoj | Estas izole ami idealon |
| 9 | (sen ili) | 4 | citaĵoj pri homnatura | | tiel longa kronologia distanco troviĝis |
| 10 | (sen ili) | 1 | tempodaŭro de la terglobo | nur kvin vortoj | terformiĝo |
| 11 | jambo, rimata | 3 | nova ero de la vivĉeno | | Ŝia utero montras burĝonon: ho saluton |
| 12 | (sen ili) | 3 | heroo Ĝingis-flano | | Newell malpravis: eĉ kapo de astronomo |
| 13 | (sen ili) | 2 | citaĵoj – kredo kaj martiroj | | Dio estas grandioza |
| 14 | (sen ili) | 2 | ega kosmospaco kaj eta strando | | Ni, pioniraj homoj de l' spacovoj |
| 15 | jambo, rimata | 3 | krueleco kaj idioteco de milito | | La urbopordo falis! Kuru, kuru! |
| 16 | (sen ili) | 3 | diversaj bono kaj malbono | | ĉar vi estas virta |
| 17 | jambo, rimata | 2 | diversaj individuaj temoj | | Mi estas l' araneo kaj la muŝo; |
| 18 | jambo, rimata | 3 | Zamenhof kaj Esperanto | | Ne estas fido nur. Subtenas faktoj. |
| 19 | (sen ili) | 2 | ĝojo de sensoj kaj la vivo | originalo Vergilius | Tavernistino siria, kun haroj |
| 20 | (sen ili) | 4 | Herooj de epopeoj sumera k.a. | | De mia malestimo venas feliĉo, |
| 21 | (sen ili) | 4 | historiaj lecionoj, hazardoj k.a. | | Ni rigardu iom la faktojn: tria milito |
| 22 | (sen ili) | 3 | sklaveco kaj kuraĝo | | <i>le jour de gloire est arrive</i> |
| 23 | (sen ili) | 1 | ekologia vivciklo | staplado de vortoj | Ĝermo |
| 24 | jambo, rimeto | 2 | giganteco de universo | | Oni ne vidas preter la lumrapido. |
| 25 | jambo, rimeto | 4 | resumo, homspaliro | | Ĉiu –ologo konas nur sian –ologion, |

verkordo: 1,2,5,9,3,7,6,10,8,12,13,4,11,14,15,16,17,19,20,18,21,25,22,23,24
 premiita de UEA 1953, eldonita de Stafeto 1956